



— 1902. —

Al la legantoj de „Lingvo Internacia“ la redakcio de la gazeto  
prezentas siajn plej korajn bondezirojn por la nova jaro!

## En la dekdua horo.

Kun tiu ĉi numero ni fermas la jar-kolekton de 1901.

Ni plenumas agrablan devon, kiam ni nun tre kore dankas niajn kunlaborantojn kaj abonantojn, kiuj havis la bonecon subteni nian gazeton per siaj plumoj kaj monoj. Kaj ni petas ilin, ke ili ne ĉesu daŭrigi siajn iradojn pluen sur la vojo jam komencita, ili pripensu serioze la celon de nia agado kaj helpu nin en la progresigo de nia komuna ideo.

Kiel la leganto scias, en la jaro ĵus pasinta okazis ŝanĝo en la persono de la redaktoro. La eksredaktoro, sinjoro Paul Nylén, kiu gvidis tre bone kaj sperte nian

gazeton dum kvar jaroj, en la lasta tempo estis tiel multflanke ŝarĝita per siaj profesiaj okupoj, ke li absolute ne havis la necesan tempon por estadi redaktoro; li do transdonis la redaktoran oficon al la ĝisnuna administranto. La kaŭzo de tiu ĉi faro estas do akceptinda, kaj ni esperas, ke tiu ĉi ŝanĝo ne kaŭzas malkontenton en niaj samideanoj.

La nuna redaktoro laŭ sia tuta forto penados kontentigi la postulojn de la legantaro; sed, por ke li povu fari tion ĉi kun rezultato, li bezonas ĝian helpon.

La afero de nia gazeto estas nun en unu mano, — ne, kiel antaŭe, en du di-

Ni petas niajn abonantojn, ili volu havi la bonecon, ensendi al ni la abonpagon por la jaro 1902. Tiu, kiuj nun — pro ia aĵo kaŭzo — ne povas fari tion ĉi, sciigu nin pri siaj abonvoloj.

versaj, malproksimaj landoj. Tio ĉi grande antaŭhelpas ne sole la intiman parton, sed ankaŭ la regulecon de nia gazeto. Kompreneble nur se la interesiĝo ne malvarmiĝos, — kaj ni kredas ke tio ĉi ne okazos.

Estas bedaŭrinda fakto, ke multaj niaj antaŭaj abonintoj ne reabonis nian gazeton en la jaro 1901 (ili preskaŭ ĉiuj fariĝis renegatoj), — sed feliĉe nove aperintaj personoj okupis iliajn lokojn en la verda kampo de l' Esperanteco. Entute oni povas kun plezuro konstati, ke Esperanto — dank' al la agado de la S. p. p. Esp. —

disvastiĝas kaj marŝas antaŭen per grandaj paŝoj.

\*

Iru do en vian eternan tombon, maljuna 1901! Ne akompanas vin tien nia riproĉo, ĉar vi malfermis la novan jarcenton sufiĉe favore por ni. Ni estus maljustaj, se ni ne konfesus, ke vi alportis bonon al nia afero. Donu Dio, ke via postulo meritu ankoraŭ plie da benoj de ni, de esperantistoj — de la tuta homaro.

Vivu Esperanto, kaj vivu ĝia dunaskita frato: la tutmonda kunfrateco, la eterna paco!

La redakcio.



## NACIAJ PROVERBOJ.

### BOHEMAJ PROVERBOJ.

- |   |   |
|---|---|
| <ol style="list-style-type: none"> <li>1. Ŝtonegon kaj veron neniu renversas.</li> <li>2. Vero ne dronas en akvo kaj ne forbrulas en fajro.</li> <li>3. Ĉiu laŭdas la veron, sed ne ĉiu defendas ĝin.</li> <li>4. Troa disputado malutilas al la vero.</li> <li>5. Pro vero la homoj plej multe koleras.</li> <li>6. Pli saĝa cedas.</li> <li>7. Pli facile estas mallaŭdi fremdan laboron ol plibonigi ĝin.</li> </ol> | <ol style="list-style-type: none"> <li>8. Nenia upupo*) ekzistas sen kufo, kaj nenia malsaĝulo sen fiereco.</li> <li>9. Ne kolere al la spegulo, se vi havas kurban buŝon.</li> <li>10. Malbone estas al ĉevalo, ĉirkaŭ kiu azenoj blekas.</li> <li>11. Tempo ŝanĝas ĉiujn aferojn.</li> <li>12. Bela vorto malfermas eĉ feran pordegon.</li> </ol> |
|---|---|

Trad. J. Holub.

\*) Birdo, nomata en la lingvo latina: *Upupa epops*, — franca: *la huppe*, — germana: *Wiedehopf*, ĉeĥa: *dudek*, — hungara: *banka*.

## HUNGARAJ PROVERBOJ.

- |   |  |
|---|--|
| <ol style="list-style-type: none"> <li>1. Kiu salutas al oni per bastono, al tiu oni resalutas per bastonego.</li> <li>2. Kiel vi semas, tiel vi rikoltos.</li> <li>3. Mensogulon oni pli rapide atingas ol hundon laman.</li> <li>4. Helpu vin mem, ankaŭ Dio helpos vin.</li> <li>5. Birdon oni rekonas per sia plumaro, homon per sia amikaro.</li> <li>6. Malplena restas la almozujō de modesta almozulo.</li> <li>7. Ne ekzistas rozo sen dorno.</li> <li>8. Bojo de hundo ne aŭdiĝas ĝis la ĉielo.</li> <li>9. Ne falas la pomo malproksimen de sia arbo.</li> </ol> | <ol style="list-style-type: none"> <li>10. Dio nek trrapididas, nek forgesas.</li> <li>11. Diru la veron, oni enrompos vian kapon.</li> <li>12. Iradu malrapide: vi venos pli malproksimen.</li> <li>13. Malrapida akvo lavas la bordojn.</li> <li>14. Plej bona estas la rekta vojo.</li> <li>15. Kapro eĉ maljuna eklekas la salon.</li> <li>16. Kiom la rado turniĝas supren, tiom ĝi turniĝas malsupren.</li> <li>17. Korvo ne elbatas la okulon de korvo.</li> <li>18. Kiu ludas kun hundo, prenu bastonon en sia mano.</li> <li>19. Ĉiu koko estas sinjoro sur sia elbalaajaro.</li> <li>20. Nur post vesperiĝo laŭdu la sunon.</li> </ol> |
|---|--|

Ankaŭ tiuj proverboj ekzistas en la hungara, kiuj estas presitaj sur la paĝo 86 inter la **rusaj** proverboj sub n-roj 1, 5, 11, 12. — kiuj sur la paĝo inter la **francaj** proverboj sub n-roj 3, 6, 20, — kaj la **bohema** n-ro 6 sin trovanta sur la paĝo 152.

Trad. pdl.



## . . . RIMARKETOJ . . .

Sciĝi kiel kaj povi tiel: talento estas;  
 sciĝi kiel kaj nepovi tiel: kritiko estas;  
 nesciĝi kiel kaj nepovi tiel: publiko estas.

SinJORINO ProHORoviĉ-KoĉMARENKO redaktados novan beletristikan ĵurnalon esperantistan: honny soit qui mal y *panse!*

P. Ahlberg.



## La homaro kaj la novaj ideoj.

Ĝis antaŭ du-tri centjaroj la homaro renkontadis la novajn ideojn tre obstine. Elkreskinte en malklereco, la popolamaso rigardadis ĉian novan ideon, nekonsentante kun la tiamaj antaŭjuĝoj, kiel malbenitan kontraŭulon venantan por pereigi la homan feliĉon. Sed, tamen ĉiu individuo aparte, ĉiu nacio kaj la homaro entute pripensadis espere pri pli granda faciligo de la ĉiutaga vivo.

La homaro multcentjara portadis kun si siajn progresojn kiel siajn bezonojn. La akiritaj progresoj subtenadis en ĝi la fajreron de l' espero, ke la pligrandiĝo de ĝia feliĉo dependas de ĝi, kaj la bezonoj aliflanke rapidmovadis tiun ĉi penson.

La proceso de la kreskado de l' spirita pakajo de la homaro entute estas tre analogia kun la proceso de la kreskado de l' infano, kiun influas la domo kun siaj tra-

dicioj kaj antaŭjuĝoj. Kiel la infano, edukita en la domaj tradicioj, renkontadas obstine fremdajn morojn kaj kutimojn, tiel same oni ion similan vidis en la homaro, kiu, kreskante en siaj multcentjaraj tradicioj kaj antaŭjuĝoj, renkontadis la novajn ideojn — portantajn returnon de la vivo — tre obstine, eĉ malamike. Se la novaj ideoj estus venintaj paŝo post paŝo kaj nerimarkeble, tiam la obstineco ne povus trovi kaŭzon de ekzistado. Kaj la kreskado de ĉia nova ideo venadas tradicie.

Aliflanke la celado de la homaro sur la vojo de l' progreso kaj evolucio naskigas homojn — verajn antaŭirantojn de la centjaroj — kiuj, portante novajn ideojn, unue iris kontraŭ la tradicioj centjaraj. En la reciproka batalado la nova ideo devis aŭ venki la multcentjarajn tradiciojn, aŭ reiri antaŭ la forteco de la nekompetenta popolamaso, kiu vidis en la nova ideo ne portatan faciligon, sed diablan reton, havantan la celon elpuŝi la ĝistiaman homan feliĉon.

Similajn antaŭirantojn de la centjaroj en la tempoj de la malnova testamento oni nomis profetoj. Ilia sorto estis terura: ili finis la vivon sub teruraj turmentoj. Venis Kristo. Li trovis plej grandan malamon inter la Izraelidoj kaj Romanoj pro la pereigita regno Izraela. La Izraelidoj atendis, ke Li antaŭkonduku ilin kaj disbatu Romon, — sed Kristo kviete instruadis: „Amu viajn malamikojn!“ Jen ideo nova, kiu kontraŭparolis al la kreskanta nacia atendado. Kaj la forto de la popolamaso kondukis la kvietan Kriston al la kruco terura.

La novtestamentajn antaŭirantojn de centjaroj ni nomas genioj. Sed la sorto de la lastaj estas mirinde analogia kun la

sorto de la profetoj, ĉar ekzistas la samaj psikologiaj kaŭzoj — la portantoj de nova ideo aŭ malnova malkovro aperas kiel detruistoj de la popolaj tradicioj kaj feliĉoj. Papino'n oni batis bone sur la Rejno pro tio, ke li eltrovis la vaporan kaldronon — hodiaŭ jam komunan movilon kaj portilon de la tuta civilizita mondo. Ĝiordano'n Bruno'n oni metis sur lignaron kaj bruligis pro tio, ke li portis ideojn, kiujn hodiaŭ ni nomas diaj veroj. Galile'o'n oni malliberigis pro malkovroj, kiujn hodiaŭ la infanoj komprenas . . . Kaj kiom ankoraŭ!

Sed de unu-du centjaroj naskiĝis tiom da novaj ideoj, tiom da novaj elpensoj aperis kaj baldaŭ efektiviĝis, ke la homaro tiel tandrita — en la nova tempo — estas pli saĝa rilate la novajn ideojn. La tuta obstineco, per kiu hodiaŭ la homaro renkontas la novajn ideojn, estas nur tio, ke ĝi tenas sin indiferece kontraŭ ili, ne dezirante disiĝi de kelkaj tradiciaj centjaraj antaŭjuĝoj kaj fine aliĝi al la nova ideo, kiel al centjara heredaĵo.

La suprediritaj pensoj iris tra mia kapo, kiam mi vidis la indiferecon de la homaro al unu granda ideo, la unuigo de l' homaro per *unu helpanta internacia lingvo*; unu plej fruktoporta malkovro, la internacia lingvo Esperanto, kies aŭtoro, se li estus naskita antaŭ tri centjaroj, kredeble estus bruligita sur lignaro kaj nun oni konstruus al li la plej grandegan monumenton.

Malantaŭ ni estas minaca estinteco, kaj antaŭ ni staras luma estonteco.

Ni laboradu do senlace kaj prudente! La pacienco alportas la tempon, kiam ni vidos la triumfon de nia afero. Aliflanke la nuntempaj ĉiutagaj homaj bezonoj de vasta komunikigo baldaŭigas tiun ĉi tempon.

Hr. Popov.

## R A B B A T T A N I T .

(De JAROSLAV VREHLICKÝ.)

Mi eliris dum bela, somera posttagmezo el la koridoroj de l' monaĥejo de Svatá Hora ĉe Přeboram.\*)

Mi rigardis kvazaŭ mirindaĵon en la freŝa naturo, kaj mi sentis en tiu ĉi momento grandan bonfaron, tian, kia estas al okulo kaj al animo la verdeco de arboj kaj de herboj; la embaraso, kiu uzurpis min en la koridoroj kaj kiu kunpremismian gorgon kiel fera ringo, malrapide degelis je la suno, kaj mi sentis ke denove kreskigas flugilojn mia animo.

Kaj tamen ankoraŭ en tiu ĉi momento prezentigis antaŭ mia vido tiuj centoj da figuroj de malseriozaj homoj superstiĉaj, kiuj, oferante cent kaj cent vaksajn korpomembrojn\*\*), serĉas helpon en la nekonataĵo kaj luliĝas per naiva ilusio de elaŭdo.

Per subita turno mi vidis min en la nacia biblioteko Pariza kaj mi staris antaŭ tiuj miloj kaj miloj da votivaj tabuloj, kiuj tien estis transportitaj por eterna memoro de la ruinoj de Kartago, kaj kiuj, dediĉitaj al la granda diino Rabbat Tanit, estas nemortemaj pruvoj de ĉiuj elaŭdoj, de miloj da petoj kaj de senfinaj preĝoj

\*) Svatá Hora (Sankta Monto) ĉe Přeboram kuŝas sur la suda parto de Prago kaj estas sankta loko de ĉeĥoj, kiel Lourdes en Francujo.

\*\*) Estas kutimo, ke ĉiu petanto oferas tiun korpomembron artefaritan el vakso, kiun ĝi havas malsana: manon, piedon, eĉ koron k. t. p.

Rimarkoj de l' tradukinto.

kaj oferoj. Kaj en mia spirito mi vidis la sanktejon de tiu ĉi nekonata diino kaj mi vidis amasojn da homoj egale mizeraj kaj egale tremantaj, petegantaj pri helpo kaj pri elaŭdo, — kaj mi vidis pastrojn egale avidajn je perlaboraĵo, kaj mi vidis naivecon eldonan al ruzeco, kaj malsaĝecon kronigatan de lukso. Kaj mi demandis: kiom ni estas pli bonaj post miljaroj? Kio estas al ni utila: nia klereco, nia literaturo, nia arto? Ni estas egalgradaj kun tiuj bonaj loĝintoj de Kartago; ni parolas al si pri kunhelpo, pri spriteco, pri kompreno kaj post tio ni redonas egale milojn da donacoj votivaj al alia Rabbat Tanit, ni ĝojas kun alia ĥimero kaj kun aliaj esperoj.

Kaj mi ne aŭdis la kanton de l' birdoj en la ĉielblua azuro kaj mi ne vidis la verdecon de l' herbejoj kaj de l' arboj: antaŭ mia vido staris idolo de l' terura kartaga Rabbat Tanit, suĉinta la forton de l' homaro kaj eniginta en ĝiajn vejnojn lacecon kaj malfortecon, instruinta ĝin konstante fidi je nekonataĵo, atendi ion de l' nekonataĵo, kontentiĝi kun ilusioj, nutriĝi kun superstiĉoj.

Kaj Rabbat Tanit ŝanĝis sian maskon dum la centjaroj: hodiaŭ alia; kia estos ĝi dum miljaroj? Sed ĝi certe ekzistos!

El bohema tradukis:

J. Jenyj.

## D I V E R S A Ĵ O J .

— En tiu ĉi numero, resp. en aparta Aldono ni presas la adresaron de niaj abonantoj.

Ĉar la adresaro okupas grandan parton de la hodiaŭa numero, ni devas prokrasti la publikigon de aliaj

artikoloj kaj precipe diversajn sciigojn en la rubriko „Kroniko“ ĝis la venonta numero, kiu eliros post unu monato kun duobla amplekso.

Al la Adresaro oni aldonu la sekvantajn:

**Bulgarujo** : 339. Vassil Todoroff, instruisto en Ĵeravna.  
340. Svet. Iv. Maneff, medic. feldŝ. en Kotel.  
**Rusujo** : 341. B. Kaplan, en Dvinsk, Ŝilderovskaja  
ul., dom Abramov.

## INFORMEJO DE ESPERANTISTOJ.

— *Kvitanco.* Kun la konsento de d-ro Zamenhof ni publikigas, ke s-ro N. Evstiféieff nun jam nenion ŝuldas al li. Tiu ĉi publikigon s-ro Evstiféieff deziris tial ke sur la kovriloj de la Biblioteko Esperanta antaŭ kelkaj jaroj estis presita, ke li ŝuldas 18 rublojn kaj iom da kopekoj.

La adreso de s-ro Prede estas de nun: „Jaransk, gubern. Wjatka, estro de l' poŝt-telegr. kontoro Jakobo Prede (Rusujo).

— **Rebusojn** ni ne presas en tiu ĉi numero.

Solvoj de la rebusoj trovataj en la n-ro 9:

I. Ŝtelisto. — II. Kartoĉo. — III.

Solvis ĉiujn rebusojn: S-rino Caroline Wieslander, Jos. Miletz, T. A. ŝĉavinsky; ne ĉiujn: N. Studenov, Gust. Roibard, E. Radvan-Ripinski, K. Vanĉev, B. Demĉenko, XYZ, B. Diaĉenko.

4	9	2
3	5	7
8	1	6

## Poŝta kesto de la redakcio.

S. M. (L-e.) Jes. Kora saluto!

„La sveda alumeto“-n ni ne ricevis. Viaj rebusoj estas bonaj, sed ni ne presos ilin, ĉar ili ne estas kompostoblaj en presejo. Danko pro via agado!

La deziritajn numerojn ni sendis al s-roj Z. kaj G.

## A N O N C O J.

La Aŭstra Esperantista Societo decidis aranĝi **ekspozicion** jam en la proksima tempo. Je tiu ĉi okazo la Societo petegas ĉiujn Esperantistojn, ili volu sendi al ĝi ilustritajn poŝtkartojn, gazetojn, portretojn k. t. p. La Societo sendos po unu ilustr. poŝtk. al ĉiu sendinto.  
**Esperantista Societo, Brno (Morav.)**

## ACÉTYLÈNE \* ÉCLAIRAGE

MAŜINOJ — BRULOJ — KORESPONDO

J. SABATIER, 233, rue St. Martin, PARIS.

*Mi deziras:* 1) tralegi aŭ aĉeti la gazeton „Esperantisto“ eldonitan en Nurnbergo dum la jaroj 1890—1895;

2) aĉeti la plenan jarkolekton de la gazeto „Lingvo Internacia“ je 1899 jaro.

Proponojn oni skribu laŭ la sekvanta adreso: „st. *Dubrovka*, Rjazansko-Vladimirskoj ŝel. dor. (Rusujo). N. Studenov.“

## Eliris el la presejo:

# MALGRANDA KALENDARO

POR ESPERANTISTOJ

1902.

Kosto (kune kun transsendo): fr. 0,55, austr.-hung. kr. 0,60, skand. kr. 0,45, rubl. 0,20. Ricevebla de juvelisto

**H. ŜTALBERG,**

en Vezenberg (gub. de Estland), Rusujo.

Poŝtaj markoj de kia ajn lando estas akceptataj.

## GRANDAJ VINOJ DE BOURGOGNE

**Moreau-Voillot**

Beaune (Côte d'Or) Francujo.

Firmo fondita en 1786, daŭrigata de patro al filo.

Akceptas honorindajn reprezentantojn korespondantajn Esperante.